

Gerda Illerhues,

## Vespera krepusko

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Vespera krepusko –  
Sinkas la sun'.  
Ombrojn ludantajn  
vidas mi nun.

Vespera krepusko –  
Susuras la vent',  
fora ekrido  
en la silent'.

Vespera krepusko –  
Aŭdiĝis jen kri',  
turmenta hastado,  
jam pasis nun ĝi.

Vespera krepusko –  
Eklumas la klar',<sup>3</sup>  
dum noktoproksimo,  
de la stelar'.

...

---

<sup>3</sup> aŭ:

Eklumas en klar',  
dum nokt' proksimiĝas,  
jen la stelar'.

Vespera krepusko –  
Tempo de l' ben',  
estonto tre foras  
kaj la maten'.

Vespera krepusko –  
ripoz' ĉie ĉi,<sup>4</sup>  
paca trankvilo  
elmane de Di'.

*Traduko de la Germana poemo "Abenddämmern" de GERDA ILLERHUES (\*1930) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2001-05-29.*

*MR-351-1b / Arg-771-1548 (2013-01-16 18:18:18)*

---

<sup>4</sup>aŭ senrime:  
ripozas la land',  
paca trankvilo  
el Dia man'.